


En la Supra Dekstra parto, esenca estas ‘tuŝmeto’ valora iom pli ol 12 poentoj.



Diag. 1 (Ĝusta kurso) Nigro komencu de ‘tuŝmeto’ N1. Atakante ‘sufokecon’ de blanka ŝtonaro, Nigro povas tiel profunde invadi.




Diag. 2 (Nigro multe gajnas) Blanko ne povas sinligi per B2. Ĉar per N3 Nigro kaptas tri ŝtonojn ▲.




Diag. 3 (konsekvenco) Blanko ne havas alian rimedon ol respondi per B2, procedas ĝis ‘forkapto’ N5. Kiom valoras la lim-aranĝon?


Post N5,...





Diag. 4　kiam proksimiĝas ludfino, aŭ Nigro forkaptos la ‘alternekapton’ per N1 kaj N3,...
{paĝo 218 de la originalo}





Diag. 5　aŭ Blanko antaŭe forkaptos du ŝtonojn per B1 kaj, kontraŭ N2 sinligos per B3.
Eblaj estas ĉi tiuj du kazoj.
Memorante ĉi tiujn, sekve ni pripensu pri Blanka lim-aranĝo.




Diag. 6　Kiam Blanko ŝtonmetas ĉi tien, kompreneble ‘sinligas’ per B1. Sekve, Nigra ‘suben-iro’ N-a estas ‘metrajton-perdanta’.




Diag. 7 Kontraŭe, B1 estas 'metrajton-tenanta' kaj oni taksas, ke Blanko rajtas ŝtonmeti B1. Nigro 'suben-iras' kiel N2 kaj ĉi tiu lim-aranĝo finiĝas {en japana regulo}.




Diag. 8 (Blanka lim-aranĝo) Finfine, ambaŭflanko singardos kaj ŝtopos liberpunkton kiel ◉ kaj ◎.
{paĝo 219 de la originalo}

Komparante ĉi tiu digarmon kun diagramo 5, ni rimarkas ke ambaŭ Nigra teritorio kaj Blanka teritorio respektive havas 6 poentojn da gajno/malgajno. (Punkto 'a' en diagramo 5 estas spuro de forkapto kaj nombriĝas je 2 poentoj.) Se ni supozas, ke diagramo 5 rezultas de Nigra lim-aranĝo, la valoro de la lim-aranĝo ĉi tie kalkuliĝas je '12 poentoj da diferenco'.

Alivorte, kiam Nigro lim-aranĝas, Nigro gajnas 6 poentojn (en diagramo 5), samtempe nuligas la eblecon ke Blanko gajnas 6 poentojn (en diagramo 8). Sumigante ambaŭon kalkuliĝas '12 poentoj da diferenco'.

Tamen, kiel jam skribita, post diagramo 3, ni devas konsideri kazon, ke Nigro plue lim-aranĝas per N1 kaj N3 en diagramo 4. Konklude, la lim-aranĝo ĉi tie estas iom pli valora ol 12 poentoj, nome 'iom pli ol 12 poentoj da diferenco'.




Diag. 9 (Ĝusta kurso 2-6) Post kiam Nigro ŝtonmetas en la plej valora lim-aranĝejo, Blanko trans-iras al 'sinligi' per B6. Kiom valoras ĉu tiu ŝtonmeto?

{paĝo 220 de la originalo}